NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4°.29012 Madrid
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz Aprilo 1993
****************************************************************************

**UK VALENCIA.**
Aliĝoj ĝis la fino de februaro: 1100 el 59 landoj. 179 el Hispanio. 93 germanoj.

Je la mezo de marto Nikola Raŝic vizitis Valencion por kontroli UK-organizajn problemojn.

POSTKONGRESA EKSKURSO AL MADRIDO. La 6-an de aŭgusto estas programata kunventago kun madridaj esperantistoj. MEL serĉas volontulojn /ne necese madridanojn) por akompani vojaĝantojn ekster kaj en Madrido dum la tagoj 1-6a de aŭgusto. UEA pagos vojaĝkoston kaj restadon kune kun partoprenantoj. Kunordigantino: Ana Manero

KONGRESAJ MECENOJ. El CORTE INGLES oferis 2500 plastajn sakojn por dokumentoj, kaj komerca firmao INALTEL SA subvencios tekojn.

GAZETARA SERVO. Lupe Sanz kaj Pedro Garrote helpas al Gian Carlo Fighiera en la organizado kaj disvastigado de informoj antaŭ la kongreso. Se vi havas konatulon en hispana ĵurnalo bv. kontaktu Liceon por faciligi dissendon de novaĵoj.

AFIŜO. UK de Valencio jam havas afiŝon. Valencia Instituto pri Turismo Elnodis 1000 ekzemplerojn kiujn LKK dissendos baldaŭ.

**NOVA LIBRO PRI ESPERANTO**
Hispana versio (tradukita de M.Cruz) de la libro "La fenomeno Esperanto", W. Auld, laŭ titolo **"Esperanto: Fenómeno de la comunicación"**, JAM ESTAS en librovendejoj. Vendo-prezo 1.300 pesetojn (inkludas sendokoston al Hispanio). 20% rabato se vi aĉetas 5 ekzemplerojn. ANTAŬPAGO NECESE pere de POŜTĜIRO al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98-4°. 28012 Madrid. NE SENDU ĈEKON.

**INFORM-FOLIO**
El eldonis inform-folion pri Esperanto kun diversaj utilaj adresoj de hispanaj esperantaj grupoj. Ni sendas kopion kune kun tiu-ĉi numero de Nia Voĉo, bv sendi al Liceo erarajn datumojn, se estas.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::
ESPERANTO LICEO DE MADRID

N I A   V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.  28012 Madrid
Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz                Aprilo 1993

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

(Nia voĉo oferas siajn paĝojn al HEF-CO por centrigi **madridajn** esperantajn informojn kaj faciligi kontaktojn kun Esperantaj grupoj kaj madridaj esperantistoj pere de revuo pli ofta ol Boletin).

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en la sidejo de MEL, Atocha 98 Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h.labortagoj en HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13).

Venontaj prelegoj, lunde je la 19.00h en Atocha 98-4°:
**19-an de aprilo "Esperanto ĝiaj rilatoj al kristanismo, anarkiismo kaj internaciismo". Prelegos Luis Ojer.**
30-an de aprilo EKSKURSO al Cheste "Valencia E-Federacio-Kongreso"

**ADRESARO DE HISPANAJ ESPERANTAJ GRUPOJ**

Kontraŭ 100 ptjn en postmarkoj vi povas ricevi de MEL ekzempleron

**KOTIZO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO POR 1993**

La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol 1992. Bv. **sendi ĉekon po 2.000 ptjn**, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭdankon por via kontribuo al daŭrigado de MEL. Dum 1992 pagis 88 personoj.

**ĈIUJ al CHESTE !!**

La 4-a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio okazos inter la 30-a de Aprilo kaj la 2-a de Majo, en Cheste. El Rotterdamo venos kelkaj spertuloj kiuj zorgos pri la adekvata preparo de UK volontuloj. LKK esperas ke al Cheste venos fervoraj hispanaj esperantistoj amase, por montri, interalie, ke LKK ne estas sola. Kelkaj madridanoj foriros 30-an vespere. Se vi deziras partopreni, telefonu lunde (5 30 87 98).

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

LITERATURA FORUMO EN BARCELONO. 17-a ĝis 22-a de julio
78-a ANTAŬKONGRESO EN BARCELONO. 20-a ĝis 23-a de julio.
78-a U.K. DE ESPERANTO EN VALENCIA. 24-a ĝis la 31-a de julio.
78-a POSTKONGRESO EN MADRIDO. 1-a ĝis 6-a de Augusto.
49-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO. Vraca (Bulgario). 7-14a aŭgusto 1993. Aliĝo pere de Kataluna Esperanto-Junularo. Apdo. 32318.08080 Barcelona. (Aliĝilojn ĉe MEL)
KULTURA ESPERANTO FESTIVALO. 19-22 aŭgusto. Kopenhago (Danlando)

MEL oferas someran T-ĉemizon po 600 ptjn, plus sendokosto. 20% rabato se vi aĉetas pli da 20.
* * *  Ni sendas remburse  * * *

**FELIĈAN RESANIĜON**

Ni deziras kompletan resaniĝon al prezidanto de MEL, S-ro González Aboín, kaj ni esperas havi lin baldaŭ en nia konversacia rondo.
Ana Manero estis operaciita je la komenco de marto, ŝi jam fartas tre bone. Fortigu Ana, ni kalkulas je vi!!